nia voĉo

madrida esperanto-liceo septembro 2012

## ESPERANTO EN TEDxMADRID

La 15-an de septembro okazos en Madrido serio da konferencoj, laŭ sistemo konata kiel TED (laŭ la angla akronimo por Teĥnologio, Distriĝo, Dizajno), sufiĉe fama inter avangarduloj en la reta mondo. Tiu evento TEDxMadrid enhavos novaĵon: unu el la prelegoj disvolviĝos en Esperanto. La preleganto estos David de Ugarte.

David, kiu sin difinas en la retejo de TEDxMadrid, kiel *Indiano kaj ludema*, estas ekonomikisto, teknologiisto kaj entreprenisto engaĝiĝinta por la novaj modeloj de ekonomia demokratio kaj la samtavola (P2P) produktadomaniero. Fondinto kaj teoriulo de la hispana kiberpunka grupo (1989-2007), de «Piensa en red SA» (1999-2002) kaj de la Indiana Kooperativa Grupo (2002). Verkisto de sciencofikcio en strangaj formatoj, li verkis du novelojn por poŝtelefonoj: «Lía: MAD phreaker (e-mocion 2003-2004) kaj «Días de frontera» (e-mocion 2002-2006).

Li ankaŭ verkis famajn eseojn kiel «11M: redes para ganar una guerra» (2004) aŭ la «Trilogion de la Retoj» -konsistantaj el la libroj «El poder de las redes», «Filés: De las naciones a las redes» kaj «Los futuros que vienen»- kiuj estis tradukitaj al sesopo da lingvoj kaj havis dekmilojn da elŝutoj kaj ankaŭ milojn da vendoj en ĝiaj paperaj eldonoj.

Pri la rilato de la Indiana Grupo kun Esperanto, kaj pri la ideoj kiujn ĝi defendas, eblas legi en la retejo http://kuriero.lasindias.com/

La organizantoj ebligis la rezervon de lokoj por ĉeesti la serion de prelegoj, por tiuj kiuj sin identigas kiel esperantistoj kaj donas la nomon de la kooperativa grupo "Grupo Cooperativo de las Indias" en la formularo por peti sidlokojn, en la retejo http://www.tedxmadrid.com/

## LA JUBILEO EĤIS EN LA AMASKOMUNIKILOJ

Kiel oni jam plurfoje anoncis, la 26-an de julio oni festis tutmonde la 125-an datrevenon de la publikigo de la Unua Libro de Esperanto. En Hispanio, la ĉefa konsekvenco de la festado estis la apero de raporto dum tiu tago en la teleĵurnalo (Telediario) de la ŝtata televidstacio TVE, dum iom pli ol unu minuto. La peco, registrita en la librejo "Casa del Libro" de la strato Gran Vía, en Madrido, inkludis la filmadon de diversaj esperantistoj madridaj kaj gastantaj en la ĉefurbo en tiu momento. La programo estas ankoraŭ rete spektebla ĉe la retejo de RTVE: http://www.rtve.es/alacarta/videos/telediario/hace-125-anos-nacio-esperanto/1491568/

Aperis informoj ankaŭ en diversaj retejoj kaj ĵurnaloj. Fine de aŭgusto, oni denove informis pri Esperanto en du radiostacioj, inter kiuj la programo "Protagonistas" de ABC Punto Radio. Ĝi konserviĝas en http://hdl.handle.net/11013/2369.

## ESPERANTO-KONGRESOJ DUM SOMERO

Somero estas la tradicia sezono por internaciaj Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj.

La Universala Kongreso disvolviĝis en Hanojo, Vjetnamio, inter 28 de julio kaj 4 de aŭgusto. Partoprenis ĝin inter alie Augusto Casquero, Rafaela Urueña kaj Luis Hernández. Tuj sekve okazis ankaŭ en tiu urbo la Internacia Junulara Kongreso.

La Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio havis sian sidejon en la urbo Galivo (Galway) en Irlando. Ankaŭ partoprenis pluraj hispaniaj esperantistoj en la amasa Itala Kongreso de Esperanto, en la urbo Mazaradelvalo, en Sicilio.

Sennacieca Asocio Tutmonda kongresis en aŭgusto en la krimea urbo Jalto.

## SAT-KONGRESO EN MADRIDO

Dum la lasta SAT-Kongreso okazinta meze de julio en Jalto, oni akceptis la proponon de grupo de hispaniaj membroj, okazigi venontan kongreson de SAT en Madrido. Ĝi verŝajne disvolviĝos fine de julio kaj komence de aŭgusto 2013, en datoj baldaŭ konfirmotaj.

Ni informos dum venontaj monatoj pri la detaloj de la evento.

## PROKSIMAJ OKAZAĴOJ

La 26-an de septembro oni festas jam de pli ol jardeko la Eŭropan Tagon de Lingvoj. Oni anoncis diversajn agadojn fare de institucioj. Se vi trovas interesan kunmemoron, aŭ se vi trovas ke Esperanto estas iel prezentebla okaze de la celebrado, bv. informi la Liceon.

Kiel ni informis en pasinta numero, Madrida Esperanto-Liceo pretigas ekspozicion kaj simpozion por projekto por la festado de la 125-a datreveno de Esperanto, danke al la subvencio de la urbestraro. Pro dataj malhelpoj, povas okazi ke la *Centro Dotacional Integrado* de la distrikto de Arganzuela, ne estos uzebla en la datoj antaŭviditaj, kaj do ni serĉas alternativojn en aliaj kulturejoj. Ni informos vin, kaj ĉiukaze, ĉiu helpo estos bonvena.

La 20-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo disvolviĝos ĉijare en Hotelo Best Cambrils, en la urbo Cambrils (Tarragona) de la 6-a ĝis la 13-a de oktobro 2012. Informoj kaj programo en http://personales.ya.com/semajno.

## NOVAJ KURSOJ

Memoru: Pedro Hernández anoncis ke li planas organizi novan kurson en Madrido, por oktobro. Se vi havas konton en FB, vi povas amikiĝi al *"Cursos Esperanto en Madrid"* en la adreso: http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid. Por aliĝi kaj ricevi pliajn informojn: http://es.groups.yahoo.com/group/esperantovallekas/

## VIZITIS NIN

Fine de julio vizitis Madridon la familio Castillon (Maria, Christian kaj Nicolas) el Francio. Kune kun madridaj esperantistoj, dimanĉe ili pasigis belan montaran tagon en la areo de Cercedilla, kaj lunde ili bierumis en Finnegans kaj sekvis promeno tra parko Retiro.

Dum pluraj tagoj fine de aŭgusto kaj komence de septembro vizitis Madridon rusaj amikoj Dimitri kaj Julia.

Brazila samideano Felipe Bombardelli venis al Madrido por studi Komputilan Sciencon en la Universitato Aŭtonoma de Madrid. Li restos en Madrido dum la tuta studkurso.

## REKOMENCIĜIS LA BABILRONDOJ

La 1-an de septembro komenciĝis denove la sabataj babilrondoj en madrida kafejo. Ĉifoje, 14 samideanoj renkontiĝis en teraso de la placo nomata la Kuboj, ĉe strato Princesa. Oni planas daŭrigi la tradicion, ankaŭ ĉijare, kaj kunvoki similajn renkontojn la unuajn sabatojn de ĉiu mnato. Ankaŭ aliaj agadoj estas planotaj por la tria sabato.

La lundaj babilrondoj en la HEF-ejo rekomenciĝos la 24-an de septembro.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, en retejo http://www.esperanto.es/mel aŭ en forumo http://esperanto.creatuforo.com/

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com